UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

LA PREZIDANTO

STOCKHOLM 23 majo 1948.
HELENEBORGSGATAN 6

S-ro Jan Strönne,
Malmö.

Amiko,

Dankon pro letero kaj pro la agrabla kunestado dum la pentekosto!

Antaŭ kelkaj minutoj telefonis al mi Almén kaj informis pri la decido de la Brita asocio rilate al la ŝanĝoj de la statuto. Mi petis lin transsendi al vi la koncernan leteron.

Evidentiĝas, ke la Brita asocio ne povas konsenti je la aldonita frazo en la paragrafo 10: "Personoj, kiuj ne respektas la principon en artikolo 4, ne estas konsiderataj kiel honorindaj".

Mi estas nun en embaraso. Unuflanke mi ne volas malpaciĝi kun la Brita asocio, ĉar ĝia eventuala eksiĝo el UEA estus katastrofo por UEA. Aliflanke mi ankaŭ ne volas tro forte kontraŭi la Balkanlandan landaron. Ni devas trovi iun kompromison.

Ĉu oni ne povus verki la tekston tiel:

"Kiel Individua Membro povas esti akceptata ĉiu honorinda persono (kaj aldoni:), kiu respektas la principon de artiko 4."

Tiel oni eventuale povus kontentigi kaj la britojn kaj la balkanojn.

Ĉu vi ne volus kiom eble plej rapide interkonsiliĝi kun Lennart Åberg, kaj poste - se vi kaj li konsentas - skribi vi skribu oficiale al la Brita asocio, ke la Sveda Federacio voĉconas la de mi menciitan tekston, kaj petante la britojn subteni tiun tekston kaj samtempe petante ilin informi ĉiujn landajn asociojn, al kiuj ili jam skribis pri la demando, pri tiu nova nowa propono. (La stokholmaj estraranoj de SEF aprobis.)

Kiel vi komprenas, mi kiel prezidanto de UEA ne povas fari iun proponon, kaj tial mi estas tre kontenta, ke vi nun estas la prezidanto de SEF, kaj ke vi kiel prez. subskribos la proponon.

Mi petas vin agi kiom eble plej rapide, por ke la afero povu laŭorde ordiĝi.

Por via informo mi sendas la statutojn de UEA kaj la protokolon de la UEA-estraro. Bonvolu post uzado resendi al mi, ĉar mi bezonas la paperojn post proks. unu semajno.

Kun kora salutoj